Urĝa Mesaĝo De La Ĝenerala Sekretario De Unuiĝintaj Nacioj

Uncategorized / By Scott

Hodiaŭ, la 23-an de marto 2020, la Ĝenerala Sekretario de UN, António Guterres, anoncis la jenan

apelacion

Nia mondo frontas komunan malamikon: COVID-19.
La viruso ne interesiĝas pri nacieco aŭ etneco, partio aŭ kredo. Ĝi atakas ĉiujn homojn, senindulge.
Dume, armita konflikto daŭre furiozas tra la mondo.
La plej vundeblaj – virinoj kaj infanoj, handikapitoj, la marĝenaj kaj la dislokitaj – pagas la plej altan prezon.
Ili estas ankaŭ la plej senŝirmaj kontraŭ plene detruaj perdoj pro COVID-19.

Ni ne forgesu, ke en landoj ruinigitaj pro milito, sansistemoj kolapsis.
Profesiuloj pri sano, jam malmultaj, estas ofte aparte minacataj.
Rifuĝintoj kaj aliaj personoj dislokitaj pro perforta konflikto estas duoble vundeblaj.
La furiozo de la viruso montras la stulton de milito.

Jen kial hodiaŭ mi alvokas al tuja tergloba paĉeso en ĉiuj anguloj de la mondo.
Venis la momento por forŝlosi konflikton kaj kune fokusiĝi je la vera granda barakto por niaj vivoj.

Al militaj partioj, mi diras:
Retiriĝu el minacado.
Flankenmetu malfidon kaj malamikecon.
Silentigu la pafilojn; haltigu la artilerion; ĉesigu la bombadon.

Temas pri decidiga momento…
Por helpi krei koridorojn por vivosava subteno.
Por malfermi valorajn fenestrojn por diplomatio.
Por alporti esperon al lokoj inter la plej vundeblaj de COVID-19.

Ni inspiriĝu de koalicioj kaj dialogado kiuj iom post iom formiĝas inter rivalaj partioj por ebligi komunajn alfrontojn al COVID-19. Sed da tiuj ni bezonas multe pli.

Finu la malsanon de milito kaj kontraŭbatalu la malsanon kiu ruinigas nian mondon.

Ĉio komenciĝas per militohalto ĉie. Tuj.

Jen tio kion bezonas nia homa familio, nun pli ol iam ajn antaŭe.

Universala Esperanto Asocio, Oficejo por rilatoj kun UN, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041